Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 6an de junio 2013, per Skype.

(Protokolo aprobita retpoŝte la 8an de junio 2013.)

Partoprenis:
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne
Eli Eriksen Fitjar en Bergen
Mario Machlik en Tromsø
Ingebjørg Rambjør en Bergen

0. Tagordo
Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 19an de aprilo 2013
La protokolo estis aprobita.

2. Ekonomio
La kasisto raportis pri la ekonomio:
Skagen Vekst kr 36 228
Skagen Høyrente kr 63 259

3. Memorŝtono en Narvik
Mario Machlik informis pri sia kontakto kun Narvik komunumo pri la memorŝtono de 1934 (vd. protokolon la 13an de decembro 2012). La skribaĵo sur la ŝtono estos restaŭrata, kaj krome estos tabuleto kun klariga teksto en Esperanto, la norvega kaj la angla. Narvik komunumo zorgos pri la restaŭro kaj flegado.

4. Landa Kunveno 2013
Aliĝis 24 membroj kaj 2 eksterlandaj esperantistoj. Ĵurnalisto intencas ĉeesti, kaj ni poluris kelkajn informojn por li koncerne tion. Okazis ankaŭ neformala diskuto pri eblaj lokoj por la Landa Kongreso en 2015.

5. Eventualaĵoj
a) UEA demandis, ĉu NEL volas partopreni ĉe la Movada Foiro dum la UK en Islando. Ni ne prioritatis tion.
b) Judith P. Abrahamsen fintradukis albumon kun Pondus-bildstrioj (vd. protokolon la 4an de junio 2009), la klubo de Trondheim provlegis la striojn, kaj ŝi komencis enpaĝigi la albumon. Ĝi verŝajne eldoniĝos ĉi-jare.

La interkonsiliĝo daŭris 21:02–22:05.
Tio estis la lasta estrara interkonsiliĝo antaŭ la Landa Kunveno, kaj oni ne planis la daton por la venonta interkonsiliĝo.
Raportis Ingebjørg Rambjør.